GISTO, JUN-2006
GOVaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo

FREMDAJ VORTOJ

Oni ja devas kntraùstari la poluon de nacia lingvo per fremdaj vortoj ne necesaj. Sed, la leganto certe konsentos ke certajn vortojn neniu kuragxas anstataùi per pura, nacilingva vorto, por eviti miskomprenon kaj tempoperdon. Neniu gasto vokus kelneron por mendi, en Brazilo “BV alportu por mi supon el “chgapeuzinhos” (Sxapeùzinjos). Italidoj memkompreneble bone scias ke en Brazilo oni sxatas varman kapeleti-supon, dum oni ne inventis propran nomon por tiu bongusta nutrajxo, nomon kurtan kaj prefere en Esperanto. Dume la vorto enradikigxas kaj restadas gxis vortaristo envortarigos gxin. Samaj poluoj okazas per vortoj el aliaj fremdlandaj radikoj tamen, Esperanto, pro gxia strukturo forte bremsas adopton de novaj esperantigitaj vortoj. La poetoj plej riskas enkonduki oportunajn novajxojn. Ekzemple, la vorton “chendi” (...lampon, fajron). Versxajne tiel trudigxis la tutmonde konata “pico”. Aliaj vicas. Por historio = estorio (rakonto, anekdoto). Historio validas por gravaj eventoj en la vivo de lando aù popolo, ne por rakonti hilaran okazintajxon. En la angla oportunas “story”=estorio, rakonto, okazinta fakto kaj “history”=historio.

Karaj gelegantoj, mi vagadas tra la vortoj, por igi vin pensi kaj eble kontraùargumenti, tial mi kutimas diri; nepre ne kritiku, helpu min surtabligi tekstojn indajn je legado, malfacila tasko se konsideri ke chiuj vi, krom spekti TV, ávidas legi jxurnalon kaj revuojn plenplenajn de novajxoj.

RIMARKO

Kiu surpaperigas legajxon enhavanta vortojn ne chiutage uzatajn, ne provas gxeni la dumvivajn lernantojn. Li celas devigi la leganton klarigi al si kaj enkapigi la vorton por li nova kaj tiel igi lin/sxin richigi sian enkapan vortaron.

OLIMPIKA ERO

Nia renoma jxurnalisto Paulo Santana dejxoras che la sportista koncentrejo en Germanio dum la olimpikaj ludoj 2006aj. Por lia chiutaga kolumno, en la jxurnalo Zero Hora (Porto Alegre) li sendas estoriojn pri aferoj rimarkitaj inter la pilkistoj. Por la tago 16/06 li sukcesis legigi novajxon meze de troaj tekstoj pri faktoj inter la sportistaj grupoj. Tiun tagon li mencias kutimojn de familioj tute ekster la moroj observeblaj inter sudamerikaj pilkistoj. Pro karenco de sunradioj la homoj avide disputas spacon sur verdaj “plagxoj” ekzistantaj meze de tieaj urboj, por havigi al siaj korpoj la necesan rimedon iomete orumi siajn aspektojn dum kelkaj monatoj. En tiu latitudo ili ne timas nocajn konsekvencojn kiel alergion kaj/aù haùtan kanceron. Sunradioj neniam estas pli ol sufichaj, tial totala nudeco ilin ege plezurigas, laù Santana. Laù li, multaj familioj arigxas sur la plejzorge traktita razeno, venas avo

kaj avinjo, genepoj kaj junaj gepatroj, por pikniki, ludi kaj distri sin, tute senzorge pri chirkaùaj pasantoj kiuj siavice kvazaù ignoras la sintenon de amaso da gefamilianoj. Nu vere, se oni flanken metas la falsan pudoron kaj ne malicas, tio ja estas naturisma sinteno same kiel en nia lando okazas iom mistere, kasxite, sur certaj plagxoj. Mi diras, falsa pudoro char nuntempe la junaj homoj nudigxas antaù ol ili geedzigxas. Post tiu evento la maturaj paroj delonge ne restas motivo por sin kasxi unu de la dua. Laù mi, sudamerikanoj estas gento tro jxaluza kaj tio bremsas publikan liberan sintenon senvestan, sed tio lante sxangxigxas, chefe depost kiam falis la cenzuro(?).

GEA

GEA kaj la estraroj de chiuj E-organizagxoj nepre legu kaj laùeble baldaù agu laù la rekomendo far nia UEA-prezidanto R.Rossetti, en la ekzemplero de la julia/augusta revuo, pagxo151, rilate al urbaj gxemeligxoj. Se mia sugesto validas, BV traduki kaj kurtigi la de Rossetti publikigitan tekston antaù ol adresi gxin al urbestroj. Oni ja scias ke al chiuj politikistoj mankas tempo, se la afero ne promesas richan rikolton el balotiloj.

BIRDOMANGXEJO

Logxantoj ankaù en apartamentoj povas gxui la gajan kunvivadon kun birdetoj kiuj vivas en la chirkaùajxo. Sufichas ami birdojn kaj memori pri ili, chefe nun dum la vintraj monatoj kiam ili ne facile trovas mangxajxojn. Sur ekstera areo oni kusxigu tukon aù unukoloran paperfolion sur kiu oni chiutage metu la rizograjnojn kiuj post la mangxo restas en teleroj. Unue la trudigxema pasero trovos la proponatan mangxajxon sed baldaù lernos, kie facile eblas nutr sin ankaù sabia', bentuvi'(kun permeso de Georgo de la Negxoj) kaj multaj aliaj, kiuj vivas libere, apude.

CHO-RO-I.

Dum pluraj lastaj monatoj sudamerikanoj havis la plezuron aùdi la chiam interesajn radioelsendojn de China Radio, per signalo, laù radioamatora skalo, S-9 kaj ech S-9+ - (Por kiu ne scias: S-9 signifas komforta, agrable forta aùdebleco. Tamen domagxe, kun la vintra sezono en nia latitudo, la signalo forte varias, lalsame en la pluraj kanaloj (R-frekvencoj). Do karaj, kiu ne perdis tempon, tiu gxuis bonan aùdeblecon kaj de nun la propagadaj kondichoj eble rebonigxos nur dum la printempo. Cetere sciatas ke la propagado de la radiaj ondoj suferas longan kurbon kiu daùras averagxe 11 jarojn, laù tabeloj konsulteblaj.

STELETO

Rimarkeblas ke pokaj el ni surveste uzas la verdan steleton. Kio okazas? Chu vi timas ke fremda samideano renkontos kaj alparolos vin en Esperanto kaj vi hontos pro via lama lingvouzo? Do, do jen motivo!? Kiaj esperantistoj ni estas, nur por aùskulti sed ne laùte kaj senerare paroli? Memoru ke flua Esperanto-uzo estas kvazaù vizitkarto, kiu montras ke vi estas **NE** pigrulo, kiel prezentigxas nia kara Lucia Karesema.

IOMete DA BONHUMORO:

CHU FANTOMO?

Noktomeze ulo preterpasas tombejon. Li aùdas ripetigxan bruon...plek...plek...plek. Tio igis lin rapidigi siajn pasxojn. La bruo daùras ech pli forte. Scivola sed iom tima, li metas sxtonon che la muro, por sin altigi kaj enrigardi la tmbejon. Viro kun chizilo kaj partelo side sur unu el la tomboj chizas sxtonplaton. – Ba... diras li, vi kaùzis al mi ektimon. – Pardonon, diras la chizanto kaj daùrigas la laboron – Sed, diru al mi, kion vi plenumas? – Mi korektas mian nomon...oni skribis gxin erare sur la sxtonplato.